

Gerda Illerhues,  
 Vespera krepusko

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vespera krepusko –  
 Sinkas la sun’.  
 Ombrojn ludantajn  
 vidas mi nun.

Vespera krepusko –  
 Susuras la vent’,  
 fora ekrido  
 en la silent’.

Vespera krepusko –  
 Aŭdiĝis jen kri’,  
 turmenta hastado,  
 jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –  
 Eklumas la klar’,<sup>3</sup>  
 dum noktoproksimo,  
 de la stelar’.

Vespera krepusko –  
 Tempo de l’ ben’,  
 estonto tre foras  
 kaj la maten’.

Vespera krepusko –  
 ripoz’ ĉie ĉi,<sup>4</sup>  
 paca trankvilo  
 elmane de Di’.

*Traduko de la Germana poemo “Abenddämmern” de GERDA ILLERHUES (\*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2001-05-29.*

*MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)*

---

<sup>3</sup>aŭ:

Eklumas en klar’,  
 dum nokt’ proksimiĝas,  
 jen la stelar’.

<sup>4</sup>aŭ senrime:

ripozas la land’,  
 paca trankvilo  
 el Dia man’.